# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Februaro : 1 2022

## ANDREO, DUKO DE JORKO, JUĜOTA EN USONO

La advokatoj de Andreo, duko de Jorko kaj filo de la brita reĝino Elizabeto la 2-a, rifuzis kian ajn ekstertribunalan interkonsenton kun Virginia Giuffre. Ŝi akuzis la dukon pri seksa perforto kiam ŝi estis neplenaĝa. Same, la advokataro petis, ke la decido pri kulpeco aŭ ne-kulpeco de Andreo de Jorko devos esti decidata de popola ĵurio. Ĉi tio sendube garantias vastan publikecon de la tuta proceso, tio ne konvenas al la brita reĝino, kiu dum la kuranta jaro festos sian 70-jaran reĝadon.

La brita reĝino antaŭ kelkaj semajnoj decidis revoki ĉiajn milit-rangojn al la princo, sia filo, kaj malpermesi lian partoprenon en reĝaj fondaĵoj, kun la celo eviti la eblan aperon de fiaj implikaĵoj, se fine la duko ricevas kontraŭan juĝon kaj li estas kondamnata pro tiu delikto.

Andreo admisiis antaŭ la juĝisto, ke li subtenis bonajn rilatojn kun Jeffrey Epstein, usona financisto, kiu en la jaro 2008 admisiis sian implikon en prostituada reto, tie li favorigis la prostituigon ĉefe de neplenaĝulinoj. Epstein mortigis sin kiam li estis en malliberejo. Tamen, Andreo de Jorko rifuzis sian partoprenon en tiuj fiagadoj.



Andreo de Jorko apud Virginia Giuffre, kiam ŝi estis 17-jaraĝa kaj nuntempe, kiam ŝi akuzas lin pri seksa perforto.

Kontraŭe, Virginia Giuffre, kiu nuntempe estas 38-jaraĝa, akuzis la britan princon pri seksa perforto kiam ŝi estis neplenaĝa. Laŭdire, la strategio de la advokatoj de Andreo de Jorko estas montri siajn dubojn pri la honesta konduto de la akuzanto. Usonaj tribunaloj petas, ke denuncanto devas havi "siajn manojn puraj". Laŭ la defendantoj de la duko, S-ino Giuffre ankaŭ partoprenis en la varbado de junulinoj ĉirkaŭ Jeffrey Epstein, do, iel ŝi ankaŭ estus respondeca de tiu prostituada reto.

# Vorto de la Semajno

**Akceso:** Akiro de titolo al aldona objekto aŭ teritorio rezulte de naturaj aŭ artefaritaj kaŭzoj.

Tio estas, la proprieto de posedaĵo ankaŭ etendiĝas al ĉio aldonita al ĝi, nature aŭ eĉ artefarite.

Ekzemple, se iu aĉetas bovinon kaj post la aĉeto oni vidas, ke ĝi baldaŭ naskos bovidon, la aĉetanto ankaŭ estas propietulo de la bovido.

Rilate teritoriojn, se ŝtato havas suverenajn rajtojn super teritorio, ekzemple insulo, kaj tiu teritorio estas pligrandigita okaze de tertremo aŭ vulkana erupcio, la aldona teritorio ankaŭ apartenas al tiu ŝtato.




*Ekzemplo de natura akceso:*

*Se post vulkana erupcio, aŭ tertremo, la teritorio de insulo pligrandiĝas, tiu ŝtato havas ankaŭ suverenajn rajtojn super tiu nova teritorio.*




*Ekzemplo de artefarita akceso:*

*Se okaze de konstruo de nova haveno aŭ de instalaĵo tuj apud marbordo, teritorio de ŝtato pligrandiĝas, tiu ŝtato havas suverenajn rajtojn super tiu nova aldona teritorio.*

Akceso estas simila, tamen ne identa al aluvio. Pere de aluvio teritorio pligrandiĝas, tamen post natura kaj multjara, ne tuja, procezo. Ekzemple, sedimentado de riveroj aperigas insulon, kiu apartenos al ŝtato pli proksima al tiu nova teritorio.